

**INTERNACIA
PEDAGOGIA REVUO**

IPR

**Eldonata de Internacia Ligo
de Esperanto-Instruistoj**

ILEI

Jarkolekto 5

N-ro 3, 1975

Pizo, Italujo

Enhavo	Paĝo
D-ro Mario Dazzini - X-a Internacia Konferenco de ILEI	49
E. Borsboom - Andreo Cseh - lia vivo	51
Tazio Carlevaro - Esperanto-movado en itallingvaj landoj	54
Rekt. Helmut Sonnabend - Leciono pri la pasivaj formoj	57
*** Ne rasoj, sed ni vivas en la mondo	64
I.C.E.M. - Edukistoj batalas por vera ŝanĝo	65
Jean Marin - Internacia konferenco de Freinet-instruistoj	66
Lis Thune - El danujo	69
Erhhi Aho - El finnujo	71
*** Someraj universitataj kursoj	koverto 3

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (IPR)

Oficiala organo de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI)
Aperas trifoje jare

Provizore redaktis: G. Turin
43. rue E. Magnin
F - 25300 Pontarlier

Kontoj: 1.) ILEI-IPR
25.28.71.464-40
Bank Mees & Hope NV
Rotterdam Coolsingel 93
2.) Helmut Sonnabend - Sonderkonto
Poŝtĉekkonto n-ro 3245 66-309
Hannover

La abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI, escepte nemembroj de ILEI povas pagi al la supre indikitaj kontoj.

I P R – Fonduso

Bonvolu helpi per via donaco al diversaj celoj de IPR-fonduso: finance helpi al IPR-ebligi abonojn en landoj havantaj valutajn problemojn-kreado de infanliteraturo-verkado de pedagogia literaturo.

Bankkonto: ILEI-IPR (fonduso), n-ro 25.28.71.464-40, Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, Rotterdam.

Xa Internacia Konferenco de ILEI

Respubliko de San Marino

23 - 29/7/1976.

Kiel jam anoncite la 24/1/1976 pere de cirkulero prot. 138/1976, danke al Prof.ino Marina Michelotti, sekciestrino de ILEI en San Marino kaj al gekolegoj de ILEI-sekcio en Cesena, la Xa Internacia Konferenco de ILEI okazos de la 23a ĝis la 29a de Julio 1976 ĉe

Casa Esercizi di S. Giuseppe
Valdragone - Respubliko de San Marino
Respubliko de San Marino

Provizora Programo

23/7, vendredon:

Je la 18-a horo: Ĉiuj gekonferencanoj estu en la konferencujo.
Je la 20-a horo: Gekolega renkontiĝo; la estraro persone salutos la ĉeestantojn.

24/7, sabaton:

Je la 10-a horo: Solena inaŭguro de la konferenco.
Programeto:
1) Muzikaĵo aŭ legaĵo
2) Salutado de la gastoj kaj konferencanoj
3) Salutvortoj de la gastoj kaj de la sekcioj
4) Festparolado de la prezidanto de ILEI: «Ne rasoj, sed ni infanoj loĝas en la mondo - la kontribuo de ILEI al kontraŭrasisma jardeko de UNESKO.
5) Kelkaj poemoj diritaj de infanoj.

Je la 20-a horo:

1) Enkonduko en la laboron kaj variaĵoj de la semajno.
2) Diskutado kaj aldonaj deziroj flanke de la ĉeestantoj.
3) Niaj zorgoj kaj sugestoj.

25/7, dimanĉon:

Je la 9-a horo: Katolika diservo
Je la 9,30-a horo: Vizito de elementa lernejo en Oltresavio, Cesena
Je la 19,30-a horo:

1) Prova ekzameno laŭ la regularo de ILEI
2) Malstreĉado (ŝercoj - kantado)

26/7, lundon:

Je la 9-a horo:
1) Enkonduko: Kiamaniere moderne instrui Esperanton
S.ino Dazzini, S.ino Thune, S.ino Taddei, S.ro Peek, S.ro Sonnabend.
2) Laboro en grupoj pri la skizitaj punktoj.

Je la 19,30-a horo:

- 1) Daŭrigado de la antaŭtagmeza laboro
- 2) Malstreĉado (ŝercoj - kantado - balo)

27/7, mardon:

Je la 8,30-a horo:

Tuttaga ekskurso al San Leo kaj Rimini

Je la 20,30-a horo:

Diskutado pei la temo *Ĉu mondvastaj lernejoj eksperimentoj realigos nian deziron oficialigi Esperanton en la lernejoj?*

28/7, merkredon:

Je la 9-a horo:

Asembleo de ILEI

1) Raporto de la estraro:

1. prezidanto
2. ĝenerala sekretario
3. vicprezidanto
4. vicsekretario
5. kasisto

2) Fiksado de novaj membrokotizoj

3) Ŝanĝoj de la statuto (la deziritaj ŝanĝoj de la statuto flanke de la sekcioj, estu ĝis la 1-a de Junio 1976 ĉe la ĝenerala sekretario)

4) Ĝeneralaj diskutoj

5) Elekto de la nova estraro

6) Je dispono de la nova estraro.

29/7, ĵaŭdon:

Matene:

1) Konkludoj, rezolucioj, fikso de la venontjara konferenco.

2) Fermo de la konferenco.

Tuj post la tagmanĝo forveturos el la kolegio la itala karavano al Ateno por partopreni UEA-kongreson. La gekolegioj kiuj havos intereson eventuale kunvojaĝi bonvolu sin turni tuj al

Gruppo Esperantista Bergamasco = Via Santa Caterina n. 16
24100 Bergamo (Italio) - Telef. 035/212.207 aŭ 035/243.839

La alveno de la karavano al Ateno estas antaŭvidita por la 30/7/1976

Kondiĉoj por la partopreno.

Kiel kutime, ĉiuj gekolegioj loĝos, manĝos kaj laboros en la sama ejo, tio estas, en granda, moderna kolegio, kiu kapablas gastigi ĝis 170 personoj.

La kosto po persono por la restado ek de la vespermanĝo de la 23a ĝis la tagmanĝo de la 29a, 6 tagoj de kompleta pensio estas:

En unulita ĉambro	L. 50.000
En dulita ĉambro	L. 45.000 po persono
En trilita ĉambro	L. 40.000 po persono

Oni esperas ke la prezoj ne altiĝos ankoraŭ ĝis la konferenco, tamen se tio okazos, oni devos pagi relativan kroman sumon proporcie al la oficiala kreskado de la prezoj en Italio.

Konsiderante ke la nombro de la unulitaj ĉambroj estas tre limigita nur la partoprenantoj kiuj aliĝos pli frue ricevos unulitan ĉambron.

Por la aliĝo kaj mendo, bonvolu skribi al

D-ro Prof. Mario Dazzini = Casella Postale 22

54100 Massa C. (Italio)

sendante la monon pere de la poŝto al pĉk n-ro 22/2883 - Giulia Catina Dazzini - Via Palestro, 36 - 54100 Massa C. (Italio).

La partoprenantoj kiuj alvenos trajne, devos atingi la stacidomon de Rimini, de kie ĉiun duonhoron forveturas aŭtobuso al San Marino. Ili devos malsupreniri ĉe haltejo Valdragone, de kie, piede, je 500 metroj, oni atingos la kolezion. Veturante per aŭtomobilo, oni devos eliri el la aŭtoŝoseo Rimini - San Marino, ĉe haltejo Valdragone, turnante maldekstren, tuj oni vidas la grandan konstruaĵon de la kolegio.

Grandega parkejo antaŭ la kolegio estos je dispono de la partoprenantoj kiuj veturos aŭtomobile.

Aliĝante, bonvolu indiki la nomon de la konferencano kun kiu oni deziras havi komunan ĉambron.

Raporto de la sekcioj.

Oni petas ke la sekcioj sendu antaŭ la fino de Junio, al la ĝenerala sekretario:

1) la raporton pri la agado de la sekcio dum la lerneja jaro 1975 -1976

2) la statistikon kaj raporton pri la esperanto-kursoj starigitaj dum la lerneja jaro 1975 -1976 (se oni ne sendis ilin jam al la vicprezidanto).

Oni ne povos esperi en la sukceso de la laboro de ILEI, se la sekcioj ne informos pri la farita laboro, precipe kiam la laboro estis efektive farita.

La ĝenerala sekretario
d-ro prof. Mario Dazzini

Andreo Cseh - lia vivo

de E. Borsboom, Livingstonelaan 236, Utrecht (Nederlando) - El monataj cirkularoj de K.C.E. n-ro 70 kaj 74, Postiers 27, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svisujo

Enkonduko

Miyamoto Masao, la japana Esperanto-verkisto, antaŭ nelonge notis, ke *Esperanto en perspektivo* estas tro literaturema, kaj ke oni devas pli atenti la t.n. movadistojn, kies nomoj en tiu verko malofte aperas, dum multaj bagatelaj verkistoj estas menciitaj. Li pravas. Necesas doni pli da lumo al la vere grandaj motoroj de la movado, kiuj hazarde ne fiksis multon sur la papero, sed tamen havis multflankajn aliajn valorojn.

Unu el la grandaj esperantistoj estas Andreo Cseh, pri kiu mi kun miro konstatis, unue ke multaj havas neĝustan aŭ nur eran konon, kaj due ke apenaŭ ek-

zistas fontoj, kiuj povas forigi la truojn en tiu kono ĉe serioza studanto. Tial mi planas priskribi felietone lian vivon en la cirkuleroj de KCE. Miaj artikoloj ne pretendas esti kompletaj, ĉar ankaŭ al mi mankas dokumentoj, ankoraŭ ne havegeblaj. Sed unu feliĉan avantaĝon ni havas: Andreo Cseh ankoraŭ vivas kaj posedas sufiĉe freŝan memorkapablon. Dum niaj rendevuoj en la lastaj jaroj mi povis demandi nenombreblajn faktojn kaj detalojn, kiujn mi utiligos en miaj sekvontaj kontribuajtoj. Ĉefaj ceteraj fontoj estas la *Enciklopedio* (1a eldono), la jarkolektoj de *La praktiko* kaj malpli konata, sed pli informriĉa la serio de 66 artikoloj, kiun Cseh prizorgis por la fama Haga semajngazeto *Haagsche Post* en la jaroj 1935-1936.

Por plifaciligi la superrigardon super la vivo de la priskriboto mi dividis ĝin en kelkaj ĉapitroj. La unua pritraktas la infanperiodon de 1895, kiam li naskiĝis, ĝis 1914, kiam li fariĝis studento. Pro tio ke mi ankoraŭ volas kolekti pli da materialo pri tiu tempo, mi preferas komenci per la dua ĉapitro, kiu kovras la jarojn de 1914 ĝis 1922. Tiu ĉi lasta jaro estas iom arbitre elektita. En ĝi Andreo Cseh translokiĝis al Bukareŝto por tie fondi la Esperanto-Centron Rumanan. Por Rumanio ĝi estis netakseble grava faro, ĉar ekde tiu momento per ĝia aktivado la Esperanto-movado fiĉe povis enradikiĝi ankaŭ en tiu ŝtato.

La periodo 1914-1922

En la jaro 1914 la mapo de Eŭropo montris ankoraŭ la fizionomion de la 19-a jarcento. Rusujo vaste eneŭrope etendiĝis preter Varsovio ĝis la germanaj urboj Thorn (nun *Toruń*) kaj Beuthen (nun *Bytom*). Interne de la limoj de alia grandega regno, Germanujo, troviĝis unuflanke Orienta Prusujo kun Königsberg (nun *Kaliningrad*) kaj aliflanke Alzaco-Loreno. Kaj meze en la kontinento vegetis Aŭstra-Hungara Imperio, tiu konglomerato de plej diversaj kaj kontraŭaj popoloj kaj landoj. Inter ili oni vidis Bohemion, Moravion, Slovakion, Galicion, Dalmation, Transsilvanion ktp. Al la hungara teritorio de tiu ĉi monarkio apartenis la laste nomita provinco: Transsilvanio. Ĝi kuŝis tute sudoriente en la regno kaj limtuŝis grandparte la en tiuj tagoj malgrandan rumanan ŝtaton. Transsilvanio estis unika lando, kiun mi poste pli larĝe priskribos. Provizore nun sufiĉas diri, ke ĝi estis dum pluraj jarcentoj pli malpli sendependa ŝtato kaj ke ĝi estis loĝata de tri popolgrupoj: hungaroj, rumanoj kaj germanoj. Ili relative pace kaj harmonie kunvivis.

En tiu subparto de la granda Danuba Imperio vagonaris iun tagon en 1914 junulo al Budapeŝto. Li nomiĝis Andreo Cseh kaj li intencis studi en la hungara ĉefurbo. La nova studento interesiĝis en la teĥnikaj eltrovaĵoj kaj sekve enskribis sin en la politeĥnika altlernejo. Pro tio ke teĥnika profesio ofte postulas fizikan fortikon de siaj anoj li ŝanĝis la studdirekton kaj unu jaron pli malfrue elektis juron. Post du semestroj la studenta vivo abrupte ĉesis pro la minacoj de la milito.

Kio ŝajnis al multaj nekredibla en 1914, tio fariĝis reala fakto en 1916. Malamikaj armeoj enpenetris en la agoniantan regnegon. Rumanoj transpaŝis Karpatojn kaj klopodis okupi Transsilvanion. Helpo por la aŭstro-hungaroj kontraŭ tiu invado venis el Germanujo. De tie oni haste transportis regimentojn orienten por haltigi la kontraŭulojn. Tio nur parte sukcesis.

Sekvis ĥaosa tempo en Transsilvanio. Enloĝantoj fuĝis de unu parto al alia. Ankaŭ Puj, la vilaĝo en kiu la gepatroj de Andreo Cseh loĝis, devis esti evakuita. La patro, direktoro de la grundregistrejo ricevis tutan vagonon por enpaki la arĥivon, dokumentaron kaj ĉiujn ceterajn objektojn de la oficejo. En tiaj tumultaj kaj pli precipe necertaj cirkonstancoj la gepatroj deziris havi la filon pli proksima. Pro tio Andreo adiaŭis la juron kaj la ĉefurbon kaj returniĝis al sia hejmlandprovinco.

La studjaroj

Post iom da ŝanceliĝo - Andreo estis la sola filo-, li decidis studi teologion kaj li enskribis sin en la seminario en Alba Julia. La urbo kuŝas meze en Transsilvanio apud la rivero Mureŝ kaj estis almenaŭ tiam la centro de la romkatolikismo en tiu ĉi lando. Ne vasta, sed tamen grava urbo, pro la sidejo de la episkopo kaj de la teologia altlernejo. Tiutempe grafo Majlath plenumis la episkopcon. Homo de rimarkebla spiritformato, grandanima, tolerema kaj dotita de larĝa homamo. Estante vera psikologo, li bone sciis interrilati kun la studentoj. Ili siavice respektis sian gvidanton pro la sincereco kaj fajna interpreto de lia religio.

Grafo Majlath tuj rimarkis ĉe la anoncanto lian plej valoran econ. Andreo scipovis krei harmonian etoson. Li simpatie kaj agrable efikis sur la ĉeestantojn. Oni ŝatis troviĝi en lia apudeco. Ĉesis en lia rondo eksciteco; kvieto kaj paco ekregis. Elradiis fluido de ia korvarmo, sentebla de ĉiu. Tiu kapablo en kombino kun profunda sento de humuro faris el li homon, kiun oni volonte vidis en sia societo.

La kontakto kun la episkopo definitive donis la direkton al la vivo de Andreo Cseh. Ĉi tiu serioze komencis studi kaj en malpli ol kvar jaroj li faris la finan ekzamenon kaj estis konsekrita kiel pastro. Lia unua laborloko fariĝis en 1920 Sibiu, granda industri-urbo ne tre malproksima de Alba Julia.

Li funkciis tie ĉi kiel vikario kaj ankaŭ kiel instruisto de religio en diversaj lernejoj.

Kaj Esperanto

En la historio de la Esperanto-movado tiuj jaroj kaj urbo fariĝis konataj pro la unua Esperanto-kurso sur tute nova bazo, kiun la juna pastro donis al fabriklaboristoj. Poste tiu ĉi instru-metodo ricevis la nomon *Ĉe-kurso*.

Ĝi ne estis la unua agado de Andreo por Esperanto. Jam en 1914, tri jarojn post la ellerno de la lingvo, li propagandis ĝin en Budapeŝto. Cseh sprite priskribis siajn aventurojn de la budapeŝta jardujo en artikolaro de *Haagsche Post*.

Li hazarde konatiĝis en aŭgusto 1914 en la hungara ĉefurbo kun tipa figuro el la Esperanto-movado, *la fervora kaj sindona pioniro, la heroa propagandisto*. Kun tiu ĉi viro - Jozefo Popper - la studento dum du jaroj kunlaboris sur la Esperanta kampo. Senlace ili klopodis disvastigi almenaŭ la nomon Esperanto en Budapeŝto, sed *la rezultoj tute ne estis en proporcio kun la faritaj penoj*.

La tiama agado estis kvazaŭ sporto de entuziasmuloj, ludo de grandaj infanoj, kiuj ne faras ekzaktan kalkulon pri la investo kaj frukto, sed ĝuas la aventu-

ron. La efikoj de la propaganda agado estis precipe gravaj por la propagandistoj mem, ĉar ili kolektis interesajn spertojn rilate la psikon de la homoj.

Ambaŭ surgluis markojn kun la vorto Esperanto sur ĉiujn lampofostojn de stratoj, eniris kafejojn kaj manĝejojn por kaŝe ornami la manĝokartojn per la sama reklam-marko. En aliaj restoracioj ili iom laŭte parolis la Internacian Lingvon, tiel ke najbartablaj manĝantoj demandis pri la nekonata idiomo. Ili petis la permeson al hungaraj verkistoj, traduki unu el iliaj literaturaĵoj en Esperanton; laŭ la motivo, ke ili volis konigi la perlojn de lingvoj de malgrandaj popoloj al la tuta mondo. La ĉefeĉ-slosiloj estis metitaj en fervojajn aŭtomatojn, tiel ke samtempe kun la bileto elfalis la vortareto. Tio impresis ĉe la publiko, kvazaŭ la reklamo por Esperanto estus oficiala aranĝo. La slosiloj ankaŭ estis fiksataj interne de enkafejaj ĵurnaloj. La legantoj ofte enpoŝigis la malgrandan libreton.

La sperto de ambaŭ diligentuloj estis, ke el *donace ricevita lernolibro neniu lernas, el aĉetita libro lernas nur ĉiu dua homo, sed el ŝtelita libro tute certe lernas la lingvon senescepte ĉiu.*

Dum la kvar jaroj en la seminario, post la hejmvveno, Andreo inter siaj kolegoj ankaŭ propagandis Esperanton. Sed nur post la konsekriĝo li vere efike komencis labori por la Movado. La urbo Sibiu fariĝis la unua mejloŝtono en lia aktivado.

E. Borsboom

Esperanto-movado en itallingvaj landoj: komento pri kelkaj mankoj

de Tazio Carlevaro, Les Hauts - Geneveys - El monata cirkulero de K.C.E. n-ro 74 Postiers 27, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svisujo

Enkonduko

La leganto eble iom miris, sed mi skribis tute korekte; kion mi intencis esprimi: mi ne parolos pri la itala Esperanto-movado, sed pri la problemoj pli ĝeneralaĵ, kiujn renkontas itallingvano kiu laboras por Esperanto en lando itallingva. Tiĉino do tiurilate havas samajn problemojn kiel Italio. Ni dividos la pritrakton en kvar partojn: unue ni parolos pri lernolibroj, poste pri vortaroj, kaj laste pri kulture prestiĝaj verkoj.

La problemoj de la «taŭga» lernolibro

La itala Esperanto-movado (kaj eĉ la Tiĉina) sukcesis produkti plurajn lernolibrojn de Esperanto. Kelkaj el ili estas bonaj, aliaj mezkvalitaj, aliaj sufiĉe malbonaj.

El la plej konataj, ni citos tri: la grandan lernolibron de *Pacelli*, la sufiĉe kompletan kaj ege konatan verkon de *Grazzini*, kaj la malgrandan lernilon de *Bardini*. Malgraŭ la malsama grandeco, ili tamen tre similas: ili baziĝas ĉiuj sur la klasika gramatika instrumaniero, ili konsistas do el reguloj, ekzemploj kaj relative monotonaĵoj ekzercoj: ĉio laŭ segmentado kaj materialkunmeto hazarda. Laŭ mi, tio neniel sufiĉas.

Ni vidu, unue, kio ekzistas por infanoj: lernolibro de Esperanto por italiaj infanoj, bazita do sur ampleksa uzo de la *natura metodo* kaj de plej variaj modernaj ekzercoj, ne ekzistas. Oni povus evidente apliki ekzistantan *internacian metodon* (*Privilegia vojo*, *SAT-junulkurso*, *Esperanto por infanoj*), sed tio laŭ mi ne estas tre bona: fakte, oni devus povi ellabori tekston bazitan sur la ekzistantaj tekstoj, sed kun speciala akcento al la malfacilaĵoj, kiujn specife renkontas itala infano en la lerno de Esperanto. Tiu apliko devus okazi sur la bazo de funda kompara studo inter Esperanto kaj la itala, kaj sur la bazo de esploroj pri la Esperanto-itala eraro-gramatiko.

Fine, oni povus demandi sin, ĉu estus oportune distingi inter lernolibro por infanoj (7-9-jaraĝaj) kaj por gejunuloj (10-14-jaraĝaj).

Por plenkreskuloj ekzistas la cititaj verkoj de *Pacelli*, *Grazzini* kaj *Bardini* (kaj supozeble multaj aliaj). Tamen, pretigo de metodike pli moderna lernilo estus oportuna. El tia lernilo oni atendus ion specialan: antaŭparolon por tiuj, kiuj ne bone scias la italan gramatikon, abundan uzon de bildoj en la senco de natura metoda instruo (tamen preferu en la maniero laŭ *Assimil*, ne laŭ tiu de *Esperanto - facila por vi* de *C. Walter*, tro bazita sur lerno de vortoj, kaj kun nesufiĉa ripetado de bazaj strukturoj sintagmaj).

Estus oportuna ankaŭ verko detale scienca, je lingvistika nivelo, kiu celas ne instrui, sed priskribi la lingvon. Tia verko mankas.

Kion atendas la hejmlernanto

Esperanton, cetere, oni lernas ne nur en lernejo, sed ankaŭ kaj eble ĉefe aŭtodidakte. Taŭga rimedo por aŭtodidaktado mankas. Ĝenerale en la hodiaŭa tempo al aŭtodidaktado oni rekomendas programitan kurson, ĉu en formo de korespondokurso, ĉu en formo de libro. Tia programita kurso permesas daŭran kontrolon de la lernoatingoj.

Lastatempe en Italio oni aperigis la programitan kurson de *H. Behrmann*. Mi povas nur bedaŭri tion pro diversaj kaŭzoj: la unua estas, ke tiu kurso tute ne estas programita. Due, mi demandas min la jenon: la kurso de *Behrmann* (ankaŭ se ne programita) segmentis la Esperanto-gramatikaĵaron kaj disponigis ĝin laŭ speciala ordo sur la bazo de kontrastiva gramatiko Esperanto-germana kaj sur la bazo de gramatiko de eraroj ellaborita dum la provo-periodo. Nu, la itala kaj la germana estas lingvoj strukture sufiĉe malsamaj, do la segmentigo de la Esperanto-gramatikaĵaro kaj ĝia dispono *devos* okazi relative alimaniere ol kiel okazis por la germana eldono de la kurso. Por atingi tion, oni devintus ellabori Esperanto-italan kontrastivan gramatikon, poste ellabori segmentadon provizoran, kaj elprovi ĝin. Sur la bazo de la elprovo oni devintus konstrui eraro-gramatikon, sur kiu definitive konstruiĝos la segmentigo kaj la dispono de la gramatikaĵaro

Esperanta. Fine, *last but not least*, devus okazi la programigo de la tuto. Oni do vidas, ke *traduko* de programita lingvokurso neblas. Krom tio, ke la kurso de *Bebrmann* tute ne estas programita, sed simple segmentita. Oni povas ĝin adapti, kaj ni vidis la ŝtupojn. Ĉu la responsivuloj de la *traduko* vere ĝin simple tradukis, aŭ ĉu ili sekvis la cititajn ŝtupojn? Ĉiuokaze la rezulto ne estis tre malsama: la italoj havas je dispono neprogramitan metodon - sed segmentitan metodon: en la unua kazo (t. e. en kazo de simpla traduko) kun kunmeto sur la bazo de la germana lingvo, en la dua kazo kun kunmeto sur la bazo de la itala lingvo.

Fine: temas pri metodo eble aspekte pli moderna, sed ne esence pliboniganta la sistemon de la segmentaĵoj de lernolibroj kiel ekzemple tiu de *Grazzini* (kie tiu sistemigo okazis hazarde).

La problemo de vortaro

Se pri la stato de la lernolibroj de Esperanto por italoj oni certe ne povas esti kontenta, ni renkontas katastrofon koncerne la vortarojn. La *Vocabolario Esperanto-Italiano* de *Tellini-Grazzini* estas antikviĝinta, arkaa, tro malkompleta, ofte malklara. La *Vocabolario Italiano-Esperanto* de *Grazzini* estas tro malkompleta kaj sen ekzemploj. Vere, se iu itallingvano volus utiligi serioze Esperanton, li ne povus turniĝi por ricevi helpon al la italaj-Esperantaj vortaroj, sed devus utiligi la francajn aŭ la rusajn.

Laŭ mi estus necesaj triŝtupaj vortaroj. La unua ŝtupo estus por homoj kiuj jam iomete scias Esperanton, sed kiuj de tempo al tempo devas konsulti vortaron. Tia vortaro devus esti simpla, poŝformata, sufiĉe komplete, sed kun plej malmulte da ekzemploj: iomete kiel la tutnovaj DDR-vortaroj de *Erich-Dieter Krause*. La dua ŝtupo estas por ek-esperantistoj, t.e. por homoj, kiuj eklernas, kaj pro tio bezonas multajn ekzemplojn - sed pri *nespecialigita* lingvo. Iusence mi pensas pri la lernejoj vortaroj italaj-francaj kaj francaj-italaj, per kiuj mi lernis la francan en mia junaĝo. La tria ŝtupo estus por specialistoj: ili do estos baze faritaj kiel la *lernejaj* vortaroj, sed estos multe pli ampleksaj, enhavos informojn pri antonimoj, paronimoj, etimologio, ktp.

Kie restas la kulture prestiĝaj verkoj?

En Italio la Esperanto-movado estas relative forta. En ĝi estas multe da literaturemuloj, multe da instruistoj, multe da kleraj homoj. La italaj esperantistoj engaĝis sin antaŭ kelkaj jaroj en la multpromesa vojo de la enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

Kaj ili forgesis, ke, sen la baza materialo didaktika, malmulto estas atingebla: mankas lernolibroj taŭgaj, mankas vortaroj, mankas legolibroj modernaj kun itallingvaj komentoj - aŭ esperantlingvaj komentoj pri gramatiko kaj stilistiko sur la bazo de kontrastivaj gramatiko kaj stilistiko Esperantaj-italaj.

Ne nur mankas, cetere, legolibroj, sed kampoj restas plene neplugitaj: kial la italaj reprezentaj literaturaĵoj klasikaj kaj modernaj neniam estis tradukitaj en Esperanton? Kial esperantlingvaj ĉefverkoj neniam trovis tradukanton italan? Ĉi tiu cetere ne nur estas problemo de la itala movado, sed de la tutmonda mo-

vado poresperanta. Estus interese aperigi el-esperanta antologio en la italan (mi mem jam komencis labori tiukoncerne)...

La lernolibroj kaj la vortaroj estas necesaj, se oni volas instrui, sed la prestiĝaj verkoj estas utila komplemento, kiu povas serioze helpi en la instruado kaj en la informado je Esperanto.

Certe, ekzistas esceptoj: rimarkinda estas la lastatempa agado de *La patrolo*, sed tio ne sufiĉas, kaj postulas komunan planadon je itallingva nivelo. Nur per planado eblas ion atingi, sur la bazo de prioritatoj starigotaj.

Kiu konsentos esti la centro de tia planada agado?

Tazio Carlevaro

Leciono pri la pasivaj formoj

de Helmut Sonnabend

A. Objekta analizo de la pasiva strukturo de la tempo

Larĝskale estis traktataj la demandoj pri la ĝusta lingvouzado de la pasivo de Esperanto. Tiu ĉi analizo sole kaj senescepte baziĝas sur la Zamenhofa lingvouzado de la pasivaj participoj.

En la Fundamento, Zamenhof eksplikas pri la pasiva strukturo de la tempo:

- prezenca participo pasiva -at ; ekz. *farata*
- perfekta participo pasiva -it ; ekz. *farita*
- futura participo pasiva -ot ; ekz. *farota*

Ĉiuj formoj de la participo estas formataj per helpo de la reciproka formo de la vorto *est-* kaj de la participo de la donita verbo.

En kiu senco Zamenhof aplikas pasivajn formojn li ekzemple montras en la *Ekzercaro* § 25:

mi estas amata
mi estis amata
mi estos amata

vi estas lavita
vi estis lavita
vi estos lavita

li estas invitota
li estis invitota
li estos invitota

Tiu ĉi komercaĵo *estas* ĉiam volonte *aĉetata* de mi.

La surtuto *estas aĉetita* de mi, sekve ĝi apartenas al mi.

Kiam via domo *estis konstruata*, mia domo *estis* jam longe *konstruita*.

Mi sciigas, ke de nun la ŝuldoj de mia filo ne *estos pagataj* de mi. Estu tran-
kvila, mia tuta ŝuldo *estos pagita* al vi baldaŭ.

Laŭ la projekto de la inĝeniero tiu ĉi fervojo *estas konstruota* en la daŭro de
tri jaroj, sed mi pensas, ke ĝi *estos konstruata* pli ol tri jaroj.

Tiu ĉi Zamenhofa lingvouzado evidentigas konscian sistemon. Ĝi signifas, ke

- *ata* estas imperfekta rilato al la tempoj: prezenco, preterito kaj futuro;
ĝi esprimas *daŭron* aŭ *ripetadon* de la ago,
- *ita* estas perfekta rilato al la tri tempoj; ĝi esprimas *rezulton* de la
ago kaj transiras en staton,
- *ota* estas predikta rilato al la tri tempoj; ĝi kvalifikas tempon espi-
mantan, ke la ago (aŭ stato) montrata de la participo *estas komen-
cota*: do nek farata, nek farita. La ago ankoraŭ *estas* intenco.

B. Didaktika analizo

La pasiva voĉo *estas* iom malfacila en Esperanto. Nome, ĉe la aktivo oni uzas
plejofte la simplajn formojn kiuj havas nur unu tempo-distingilon (*-as*, *-is* aŭ *-os*);
tiujn facile *estas* apliki.

Sed ĉe la pasivo la tempo *estas* duoble distingita:

- per la helpa verbo
- per la participo.

Oni do devas decidi pri du tempo-distingiloj (PGE).

Didaktike ni devas vidi la duflankan aspekton:

- la signifo de la helpverbo en ĝiaj tempoj konekse la participojn,
- la imperfekta, perfekta kaj predikta rilatoj de la pasivo.

Estas rekomendinde *unue* trakti la tri rilatojn de la participo kaj apliki sek-
vantan vicordon:

- *ota* - *ata* - *ita*

Ĉar tio *estas* la normala pensmaniero de la infano:

ĝi ricevas taskon por plenumi
ĝi plenumas la taskon
ĝi plenumis la taskon

La infano ne povas tutsimple derivi la tempojn el la propra lingvo por apliki
ilin en Esperanto. Ĝi devas lerni tute novajn penskategoriojn, ĉar - *ota*, - *ata* kaj
- *ita* ne signifas tempojn. Do la infano devas lerni!

unua lerncelo: *kio signifas -ota?*
dua lerncelo: *kio signifas -ata?*
tria lerncelo: *kio signifas -ita?*

La dua didaktika kampo *estas* la konekso al la tempoj traktotaj laŭ tri paŝoj:

kvara lerncelo: *la kunligo de -as, -is, -os kun -ota*
kvina lerncelo: *la kunligo de -as, -is, -os kun -ata*
sesa lerncelo: *la kunligo de -as, -is, -os kun -ita*

C. Metoda analizo

Por faciligi la komprenon *estas* konsilinde ne bloke prezenti la tutan komple-
kson. Ni traktu unue la unuajn tri lerncelojn. La tasko *estas* transformi abstrak-
tan ideon en konkretan komprenon. Ni iru la deduktan vojon.

Antaŭ la lernantoj staras sur tablo diversaj objektoj, kiel botelo da lakto, sk-
atoleto da ĉokolado, koverta kun leterpapero, iu nelegita libro, tordita naztuko.
Interparolo pri la objektoj kondukas al la demando, kion oni povas fari pere de
la objektoj. Iom post iom ekestas tabula bildo. Direktitaj demandoj donas la de-
ziritajn verbojn: ĉu mi povas trinki aŭ manĝi la lakton?

Tabula bildo:

lakto — *trinki*
ĉokolado — *manĝi*
letero — *skribi*
libro — *legi*
naztuko — *gladi*

Por direkti la pensmanieron, la instruisto demandu:

ĉu mi jam trinkis la lakton?
ĉu mi jam manĝis la ĉokoladon?
ktp.

En la menso de la gelernantoj formiĝas la - *ota* formo.
Nun metas la instruisto al ĉiu opa objekto du aliĝintajn:

al bloko da ĉokolado	duonmanĝatan	kaj konsumitan	(papero restas)
al botelo da lakto	duontrinkatan	kaj eltrinkitan	
al leterfolio	duonskribatan	kaj finskribitan	
al nova libro	duonlegatan	kaj finlegitan	
al torda naztuko	duongladatan	kaj fingladitan	

La grupiĝo okazu en malorda formo!

La infanoj devas nun ordigi la grupajn objektojn kaj supozeble trovas la ĝustan vicordon. Ili motivas sian agon, ke ekz. la botelo da lakto estas plena, dum trinkado duonplena kaj finfine malplena.

Post la ordigado de la objektoj iom konsciiĝas ke temas pri tri aspektoj de tri diversaj statoj.

Nun la instruisto devas transiri al la problemo, ke io okazas al la objektoj. Li demonstreu per ioma trinkado kaj demandu, kio okazas al la lakto.

Tio fariĝu baza demando:
kio okazas al la objektoj?

en la tri aspektoj. Tiel spertas la lernanto la lingvan mankon.

La instruisto skribas nun:

<i>La lakto estas trink</i> -	(plena glaso)
<i>La lakto estas trink</i> -	(duonplena glaso)
<i>La lakto estas trink</i> -	(malplena glaso)

Eble la gelernantoj nun faru proponojn, despli ili ekkonas la lingvan problemon.

Nun donu la instruisto la solvon dirante, ke ni por la plena glaso diru: *trinkota*, por la duonplena glaso: *trinkata*, por la malplena glaso: *trinkita*, kaj kompletigu skribe la skribitajn frazojn (farbe!).

Antaŭ la objektojn aktajn li metu preparitajn striojn:

<i>trinkota</i>	<i>trinkata</i>	<i>trinkita</i>
-----------------	-----------------	-----------------

Aliaj preparitaj strioj sur kiuj estas skribitaj:

<i>manĝota</i>	<i>manĝata</i>	<i>manĝita</i>
<i>skribota</i>	<i>skribata</i>	<i>skribita</i>
<i>legota</i>	<i>legata</i>	<i>legita</i>
<i>gladota</i>	<i>gladata</i>	<i>gladita</i>

la instruisto disdonu al la gelernantoj. Ili ĝuste metu!

Samtempe kun la ago la gelernantoj parolu la frazojn! Al la gelernantoj la instruisto sugestu trovi ian regulon. Por faciligi la taskon la instruisto postulu, ke ili ordigu nun la objektojn en ata-grupoj, ita-grupoj kaj ota-grupoj.

La ideo estas, ke la gelernantoj nun ekkonu, ke ĉiuj tri grupiĝoj - ĉiu por si mem - posedas unu komunecon:

- la *ota* grupo : ĝis nun ne komencita ago, sed intencata; *okazos* io,
- la *ata* grupo : komencita ago, sed ne finita - daŭras
- la *ita* grupo : finita ago.

Nun la gelernantoj devas ricevi ian regulon, por ke la pensprocezo ankaŭ lingve fiksiĝu. La regulo devas esti tute simpla, ĉar origine la pasivaj formoj ne estas komplikaj, tute kontraŭe, ili donas la eblecojn, klare esprimi tri bazajn formojn

de la agadoj:

okazos io al io aŭ iu
okazas io al io aŭ iu
okazis io al io aŭ iu

Pro tio ni povas diri:

- 1-a regulo: objektoj aŭ personoj, al kiuj okazos io, estas *ota*,
- 2-a regulo: objektoj aŭ personoj, al kiuj okazas io, estas *ata*, kaj
- 3-a regulo: objektoj aŭ personoj, al kiuj okazis io, estas *ita*.

Unu desegnaĵo el nia traktita objektvico estu simbolo:



trink-ota



trink-ata



trink-ita


ekzercilo I




La lakto estas trink -



La pordo estas ferm -



La libro estas leg -



La letero estas skrib -



La ĉokolado estas manĝ -

Ekzercilo II

frazoj	okazos io al ...	okazos io al ...	okazos io al ...
1. La muro estas tapetota.			
2. La kafo estas trinkata.			
3. La kolbaso estas manĝita.			
4. La kuko estas bakata.			
5. La legomo estas kuirota.			
6. La pilko estas puŝita.			
7. La ŝtrumpoj estas lavataj.			
8. La knabino estas fotota.			
9. La kofro estas pakata.			
10. La harato estas kombita.			
11. La hararo estas frizota.			
12. La pantalono estas broŝata.			

Planita lekcio

tempo	instrupaĵoj	rimarkoj
10 min.	<u>Motivacio:</u>	
	1.1 Kanto: Kiam per matena ruĝo...	
	1.2 konversacio pri la objektoj starantaj sur la tablo. Paroligi la infanojn. Kion mi povas fari pere de la lakto?	glaso da lakto ĉokolado letero libro nastuko
	1.3 Tabula bildo: lakto - trinki ĉokolado - manĝi letero - skribi libro - legi nastuko - gladi	

tempo	instrupaĵoj	rimarkoj
25 min.	<u>Ellaborigo:</u>	
	2.1 direktado de la pensmaniero al «ota» -aspekto. Demandoj: Ĉu mi jam manĝis la ĉokoladon?	La infanoj respondu fraze
	2.2 Aldono de la aliaj objektoj: duonkonsumita lakto, duonkonsumita ĉokolado, ktp.	en ordotaj grupiĝoj
	2.3 Ordigado de la objektoj pere de la infanoj: plena glaso duonplena glaso, malplena glaso.	Planita vicordo: ota - ata - ita
	3. <u>la problemo</u> Kio okazas al la objektoj en la tri aspektoj?	lernantoj sentas la lingvan mankon.
	3.1 tabula bildo: la lakto estas trink- la lakto estas trink- la lakto estas trink-	plena glaso duonplena glaso malplena glaso
	3.2 proponoj de la infanoj	
	3.3 La instruisto donas la solvon: por plena glaso: trinkota por duonplena glaso: trinkata malplena glaso: trinkita	aldono al tabula bildo
	3.4 al la objektoj la infanoj almetas preparitajn striojn	ekz. manĝota, manĝata, manĝita
	4. <u>meditado</u>	
	4.1 la objektojn novordigi laŭ grupaj aspektoj	ota-grupo ata-grupo ita-grupo
	4.2 la infanoj nomas la komunecon en ĉiu grupo	
	5. <u>la regulo</u> 1) objektoj aŭ personoj, al kiuj okazos io, estas <i>ota</i>okazas io, estas <i>ata</i>okazis io, estas <i>ita</i>	tabula bildo tabula bildo
	5.1 desegnaĵa simbolo	
10 min.	6. <u>aplikado</u>	
	6.1 testfolio I	
	6.2 testfolio II	

Ne rasoj, sed ni vivas en la mondo

La kontribuo de la infanoj en la mondo al la
Kontraŭ-Rasisma Jardeko de UNESKO

Programo

1. Infanaj vizaĝoj el la tuta mondo
2. Infanoj ludas kaj okupas sin
3. Infanoj ĉiam lernas
4. Infanoj manĝas
5. Infanoj malsatas
6. Infanoj en la hejma vivo
7. Kiel infanoj vidas plenkreskulojn
8. Kion infanoj plej deziras
9. Infanoj aktoras
10. Kiel infanoj festas

Proceduro

1. La temoj povas esti solvitaj per fotoj, desegnaĵoj kaj raportoj.
2. La plej granda formato estu DIN 3, la plej malgranda DIN 4.
3. Gis la 15-a de novembro 1976 estu la materialo laŭ eble fotografita (pligrandita) ĉe la kolektonto s-ro Fairbank en Parizo
4. Parizaj gekolegoj bonvolu endosierigi la tutan materialon kaj prezentu ĝin al la direktoro de UNESKO petante, ke ILEI havu la rajton ekspozicii la laboraĵojn en la halo de UNESKO.
5. Post la Pariza ekspozicio la materialo estos je la dispono por pluaj ekspozicioj en la mondo.
6. Ĉiuj afiŝetoj sub la ekspoziciaĵoj estu dulingvaj (nacilingve-esperante).

Edukistoj batalas por vera ŝanĝo

I.C.E.M. - pédagogie Freinet - place Bergia B.P. 251 - F-06406 Cannes - Francujo.

De dekoj da jaroj edukistoj senĉese plimultaj komprenis la neceson transformi la publikan instruadon en ĉiuj gradoj (de la infanĝardeno ĝis la universitato).

Sen atendi malproksimajn ŝanĝojn nepre farotajn, ili ek de nun ŝanĝis la lern-laboran stilon, starigis rilatojn aliajn ol la ordonpovon kaj la majstran lecion, donis al la gejunuloj la rajton sin esprimi kaj respondi, agis tiel, ke la lernejo estu alia ol ejo de trudado kaj enuo.

Tiun ĉiutagan batalon por alia edukado tiuj edukistoj ofte direktis domaĝe al sia persona kariero, kontraŭ la hierarĥioj ĵaluzaj pri sia estreco. Necesis klarigi al maltrankviligitaj gepatroj, ke oni devas transformi la instruadon laŭ tia direkto, ke ĝi estu favora al iliaj gefiloj, kaj ne kontraŭ ties estonteco.

Multaj el tiuj batalantoj grupiĝis ĉirkaŭ pioniro de moderna edukado, *Célestin Freinet*, por krei movadon, t.e. la Kooperativa Instituto de Moderna Lernejo (I. C. E. M.). Dum sia persona libertempo, per sia propra mono, sen alia financa aŭ administra helpo, ili alĝustigis novajn lerneajn teĥnikojn, novajn ilojn, kiujn diskonigas la C.E.L. (Kooperativo de laika instruado), kiun ili tiucele kreis.

Ĉar ili rifuzas la trompajn ŝanĝojn, kiujn oni prezentas al vi kiel valorajn solvojn, ili mem denove financis informpropagandon: per sia mono ili publikigis tiun ĉi faldfolion.

Se vi opinias, ke la rolo, kiun ili prenis en la pedagogia vivo, estas utila, sub-tenu ilian agadon.

Se vi konas instruistojn, kiuj praktikas la Freinet-pedagogion, pere de ili interrilatu kun la departementa grupo pri *Moderna Lernejo*. Konatiĝu kun la revojoj de I.C.E.M.; kelkaj estas eldonitaj por la edukistoj, aliaj por la gelernantoj.

Se vi konas neniun, skribu al la ĉi-suba adreso por peti la adreson de la grupo *Moderna Lernejo* de via departemento.

Edukistoj, gepatroj, gejunuloj, civitanoj interesitaj pri la edukaj problemoj ne hezitu skribi por esprimi kion vi pensas pri la enhavo de tiu faldfolio. La edukado ne estas problemo de fakuloj, sed afero de ĉiuj.

Internacia konferenco de Freinet-instruistoj

Grava evento en Polujo dum aŭgusto: 9a R.I.D.E.F. - Internacia renkontiĝo de
geinstruistoj praktikantaj pedagogiajn Freinet-teĥnikojn.

Kio estas tiuj Freinet-teĥnikoj?

Por trafte taksu kaj kompreni la Freinet-pedagogion necesas iom scii pri la vi-
vo de Freinet, ties elpensinto.

Kiu estis Freinet ?

Freinet naskiĝis en 1896, en malriĉula provinca familio. En 1917, novbaki-
ta instruisto li estas ĵetita en la ŝtormon de la unua mondmilito; gravege pulmvun-
dite li preskaŭ mortas. Pli malpli resaniĝinte li tamen ricevas postenon en 1920
ĉe elementa lernejo. Sed li malfacile eltenas instrulaboron, kiu postulas longajn
paroladojn, pro sia limigita spirpovo. Multe leginte el verkaĵoj de famkonataj pe-
dagogoj, kiaj Maria Montessori, Dewey, Decroly, Makarenko, li sopiras al pli na-
tura kaj racia instrumetodo; li antaŭsentas, ke infanoj posedas en si mem neme-
zureblan potencialon.

Tiam prezentigas favora okazo por vere motivita laboro: kolektiva redaktado
de la unua libertema verkaĵo (la helik-vetkurado), tuj post la evento, en granda
entuziasmo. Vivo ĵus eniris la klasĉamburon! kaj ne plu eliros. Sinsekve Freinet
enkondukas, krom libertemaj verkaĵoj, enketojn, memesplorajn taskojn kun ra-
portoj, klasgazeton, korespondadon...

1924: unua interŝanĝo kun gelernantoj en Bretonio.

1926: unua metiista presilo, el ligno, kiu ebligas aperigon de la unua presita
lerneja gazeto.

1928: ĉar rapide multnombrigas la rondo da disĉiploj, kaj pro fabriki kaj dis-
tribuadi la ilojn de tiuj bezonataj: kreado de la C. E. L..

C. E. L. (*Coopérative de l'Enseignement Laïc*): Kooperativo por Laika Ins-
truado. Nun ĝi eldonas ĉiujn revuojn kaj fabrikas ĉiujn ilojn ellaboritaj de la di-
versaj laborkomisionoj, kaj de laborantaj gelernantoj el ĉirkaŭ 20.000 klasoj de l'
I. C. E. M. (inter aliaj: B.T., *Bibliothèque de Travail* (laborbroŝuro); B.T.J. por
elementaj lernejoj; B.T.2 por duagrada; B.T.R. por esplorlaboro; aŭdvidaj B.T.;
kaj revuoj *L'Éducateur*, *l'Art Infantin* (infana arto), k. t. p.....).

Sed ege malplaĉas al la reganta burĝaro tiu pedagogia metodo, kiu estas esen-
ce popola kaj celas al edukado de ĉiuj infanoj sen ia ajn diskriminacio, por ke
ankaŭ la malriĉulaj fariĝu homoj konsciaj pri sia digneco. Freinet tial ricevas gra-
van baton de la lokaj burĝoj, kiuj sukcesas atingi al lia eksigo. Ne plu povante in-
struadi en oficiala lernejo, Freinet mem konstruadas privatatan en Vence, en kiu li
tute libere povos eksperimenti siajn teĥnikojn. 1939: denove tutmonda sanga
ŝtormego. Freinet enkarcerigita pro siaj ideoj; iom poste liberigita, sed sub streĉaj

- Ebligi informadon pri stato de la Freinet-pedagogio kaj de la progresemaj
pedagogioj en diversaj landoj.
- Faciligu diversfacetan malkovron de la akceptlando.
- Eksperimentadi por daŭra formado de la instru-
edukistoj per skipa laborado
okaze de aktivaj faraĵoj en esplorado, kreativo kaj komunikado.

La ĉijara, en Pollando, estos la 9a. La aliaj okazis en Belgio (1968) - Italio
(1969) - Bratislava, Ĉeĥoslovakio (1970) - Beyrouth, Libano (1971) - Hillroed,
Danio (1972) - Carthage, Tunizio (1973) - Edimburg, Britio (1974) - Tlemcen,
Alĝerio (1975).

En R.I.D.E.F. Esperanto devus esti komunikilo!

«La Freinet-pedagogio ne povas esti alia ol Internacia. Tiu internacieco estas
ne nur moto, sed ĝi estas ankaŭ nepre neceso. Ĝi estas bazo de paco.» (*El la Ĉar-
to de Moderna Edukado - Freinet-teĥnikoj*).

La R.I.D.E.F.-oj estas internaciaj; sed pro tio mem ofte estiĝas malfacilaĵoj
pro lingvo. Ĉijare, en la patrolando de Zamenhof, kelkaj laborkomisionoj - kiel
iam unu en Hillroed (Danio) - uzos Esperanton, en siaj debatoj, kiel oficialan lin-
gvon. Krom tio, inter la diverslande devenaj geinstruistoj, kaj ĉefe kun la Poloj,
interplektiĝos amikecaj rektaj kontaktoj, kies fruktodonecon tute ne bezonas
emfazi. *Esperantistaj Geinstruistoj de la tuta mondo partoprenu kiel eble plej
multnombre!*

Antaŭ - R. I. D. E. F. en Gresillon (Francio):

Kiuj deziras perfektigi en Esperanto-praktikado kaj tiele prepari sian parto-
prenon en la Varsovia R.I.D.E.F., tiuj ĉeestadu dektagan staĝon I.C.E.M.-Espe-
ranto en la *ESPERANTISTA KULTURDOMO* en *GRESILLON* (49150 Baugé,
Francio), verŝajne de la 12a ĝis la 22a de julio 1976. Por informado kaj enskribi-
ĝo, sin turni al :

*Edmond PLUTNIAK, 1 place de la Mairie, Bavincourt - F-62158 L'ARBRET -
Francio.*

Aliĝo al la R. I. D. E. F. en Pollando:

Ĝi okazos en *PLOK*, proksime al Varsovio, de la 2a ĝis la 16a de aŭgusto
1976. Ĝi estos organizita laŭ principoj de koopera kunvivado en ĉiuj siaj diver-
saj flankoj (laborplanado, distribuado de lokuzado kaj materialoj, kunsidanima-
do, vizitoj, enketoj, ktp...). Ĉiu partoprenos en animado kaj organizado.

La gekolegoj, kiuj ne jam scias pri R.I.D.E.F., tiuj trovos tie unikan okazon
por ĝin ekkoni, kaj ankaŭ por plenumadi tri agojn egalvalorajn:

- 1 - Malsupraĝe malkovri Pollandon helpe de Polaj samideanoj.
- 2 - Praktiki Freinet-pedagogion, kiel plenaĝuloj, per uzado de ties fundamentaj
teĥnikoj, kio konsistigas plej bonan inicon.
- 3 - Praktike kaj intense uzi Esperanton dum efektiva studperiodo, cele al efika
lingva perfektigo.

Ne ellasu tiun okazon!...

Nepre necesas scii plej eble frue pri la nombro de geesperantistoj (eĉ komen-
cantoj), kiuj partoprenos en tiu renkonto.

Pro tio, la interesatoj bonvolu senprokraste sendi la ĉi-malsupran aliĝilon, el-
tondita kaj konvene plenskribita, al adreso jena:

Jean Marin, 9 rue Adrien Lejeune - 93170 Bagnolet - Francio.

kondiĉoj. Lernejo en Vence fermita. Fuĝado; militrezistado en Alpoj...

En 1947, la lernejo en Vence denove malfermiĝas. Laŭ vojo pli malpli glata la afero progresas: kongresoj ĉiujare arigas geinstruistojn pli kaj pli multnombrajn. Modernaj Freinet-teĥnikoj eĉ tutmonde disvastiĝas; tial en 1964 naskiĝas la F.I.M.E.M..

F.I.M.E.M. signifas: *Fédération Internationale des Mouvements d'Ecole Moderne* (Internacia Federacio de la Movadoj pri Moderna Lernejo), kaj radias al 38 landoj. Ĝia bulteno estas «La Ligilo» (*le Lien*).

La franca sekcio el F.I.M.E.M. estas I.C.E.M.

I.C.E.M. (*Institut Coopératif de l'Ecole Moderne*): Kooperativa Instituto pri Moderna Lernejo. Ĝi strukturiĝas el distriktaj grupoj, laborkomisionoj; eldonas du bultenojn: *L'Edicateur* (la Edukisto) kaj *La Brèche* (la Breĉo), kaj dekon da diversaj revuoj por infanoj, adoleskantoj kaj adultoj.

Malfeliĉe, la 8an de oktobro 1966 mortis tiu altvalora homo, kiu forkonsumis ĉiuj siajn fortojn cele al starigo de vere popola edukado.

Tamen postvivadas lia giganta verkaĵo... Pri tio atestas interalie la vivoplenaj renkontiĝoj okaze de R.I.D.E.F.

Bazaj ideoj de la Freinet-pedagogio:

- Edukado celas plenan disvolviĝon de la individuo, sed ne ties dresadon, nek submetiĝon, ankaŭ nek akumuliĝon de sciado en lia cerbo.
- Forpelata ja estas ĉia endoktrinigo aŭ endogmigo. La infano fariĝu estontece kapabla respondeculo en socio morgaŭa, el kiu malaperu milito, rasismo, diversspeca diskriminacio, ekspluatado de homo per homo.
- Nur la vivo plene fike instruas homon; por akiri ĝiajn sciigojn ni sekvu naturajn vojojn.
- Freinet konvinkiĝis, ke ĉia mensa akiraĵo efektiviĝas per propra esprimeksperimentado.
- Vera kaj profunda edukado fontas el laboro, sed de laboro motivita kaj libere elektita; nu, lernotaj temoj nepre devu de la infanoj mem.
- Konsiderante, ke esprimdeziro, impeta emo al komunikado kaj agado, estas nepraj kaj esencaj bezonoj ĉe infano, ni ebligu al tiu ĉi kreivan laboron.
- La infano trovi en lernejo fidoplenan etoson, kompreneman medion kun libere akceptita disciplino.
- Lernejo iĝu esence popola, kaj plej altgrade emancipanta tiel por la geinstruistoj, kiel por la gelernantoj.

La F.I.M.E.M. Kreis, laŭbezone, diversajn internaciajn renkontiĝojn:

S. I. M. (*Stage International Méditerranéen*): Internacia Staĝo por Mediteraneaj Landanoj.

S. I. N. (*Stage International des pays Nordiques*): Internacia Staĝo por Nordaj Landanoj.

R. I. D. E. F. (*Rencontre Internationale Des Educateurs Freinet*): «Internacia Renkontiĝo de Geinstruistoj Instruantaj laŭ Freinet-pedagogio». En R.I.D.E.F. arigiĝas ne nur geinstruistoj, sed ankaŭ pedagogiaj serĉantoj, kaj simpatiantoj kun la Freinet-pedagogio, por pliprofundigo de pedagogiaj scioj, kaj ankaŭ por interŝanĝoj pri ideoj kaj eksperimentrezultoj.

Ĝi aparte celas:

(Eblas ankaŭ sendi aliĝilon per aparta paperfolio laŭ la ĉi-malsupra modelo).

Aliĝilo

S-ro, S-ino, F-ino NOMO:

Antaŭnomo:

Kompleta ADRESO:

Telefon - n.ro:

Nivelo de Esperanto-scipovo: ALTA - MEZA - MALALTA

intencas partopreni en R.I.D.E.F. 1976 en Pollando.

Rimarkoj, demandoj, sugestoj:

Dato:

Subskribo:

(Resendenda plej eble frue al:

Jean MARIN, 9 rue Adrien Lejeune - 93170 Bagnolet - Francio).

el danujo

Skizo de publika letero al ministeria komisiono instruplana por la popollernejo. Traduko el la dana de Lis Thune, Brombærvænget 15, DK-2650 Hvidovre, Danujo.

Via skizo al instrukonsilado pri fremdaj lingvoj (dec. 1973) estas publikigita en *La lingvo-instruisto*, organo de *Sprogsams* (Uniĝo de asocioj por lingvo-instruistoj), n.ro 1/1974.

La enkonduko prezentas la koncepton, ke la skizo povas kontribui al la ne nur necesa novorientiĝo rilate al lingvoinstruado, sed ankaŭ krei bazon por konstrua debato pri la problematiko koncerne al lingvoinstruado en la popollernejo, aŭ - kiel oni esprimas aliloke - *povas kontribui por akceli pozitivan kaj fakan debaton pri kondiĉoj, celo kaj rimedoj de la lingvoinstruado.*

Interesa parto de la skizo prezentas punktojn 1.2 kaj 3.1, en kiuj vi vin okupas pri la celo de lingvoinstruado. Tre positive vi atribuas akcenton al la signifo de la lingvoinstruado: 1. *Kiel kontribuo al la lernantoj havi pli bonajn eblecojn por sin orienti pri homoj en aliaj landoj... kaj per tio akiri pli bonan bazon por interpopola kompreno, ke ĝi povas doni al la lernantoj eblecojn akiri al si kapablon kaj sperton kun praktika valoro por ĉiu individuo kaj por la socio, ĉar la lernantoj alproprigas al si plej gravan vortprovizon, 3. por alkutimiĝo al kaj kompreno por la laborprincipoj kaj metodoj koncerne la lingvo-lernadon.*

Ĉiu povas aprobi la rimarkon en 3.1 nome ke: *la kreska internacia interrilato kaj kunlaboro kaŭzas, ke fremdlingva instruado treege gravas en la entuta instruado... kaj ke al la kondiĉoj de malgranda lingvo-regiono apartenas precipe ĝia devo ebligi komunikon kun pli grandaj lingvo-regionoj.*

Rekonante ke la fundamentaj principoj validas por ĉiu lingvoinstruado, kaj kun la deziro ĝisdate koni la staton de tiu ĉi, D.L.E. (Esperanto-asocio de danaj Instruistoj) trovis tion nature, ke ĝi pritraktu la skizon dum sia jarkunveno la 1974.05.25.a por ke ankaŭ ni povu kontribui al la priparolita debato. El nia pritrakto rezultis la sekva propono al kompletigo de la skizo per jenaj punktoj:

12. **Celo** - Uzante Esperanton oni kontribuas al la demokratiigo de la lingvo-instruado - plurmaniere. **A)** Ĝi ebligas, ke la lernantoj per akceptebla laborinvesto povas akiri kontakton kun homoj de ĉiuj lingvo- kaj kulturregionoj, kaj per tio oni donas gravan apogon por eduki la novajn generaciojn vivi en paco kaj reciproka respekto. **B)** Akiron de lingva labormetodo kun vastigita lingvokompreno, kiu ĝis nun estas rezervita al la malmultaj pro la malfacileco de la naciaj lingvoj, ebligas la logike konsista kaj regula internacia lingvo. **C, D)** Krome, per akcelo de instruado en neŭtrala lingvo povas ankaŭ Danlando kontribui al mildigo de tiu lingva premo, je kiu ni kaj aliaj nacioj suferas flanke de la grandpotencaj nacioj, kaj samtempe progresigi internacian pensmanieron.

13. **Rimarkoj al la celo** - Pro la forte kreskantaj kontakt-eblecoj aperas bezono por komuniko ankaŭ kun aliaj landoj ol tiuj kun anglosaksaj kaj franca lingvoj. Por tiun bezonon kovri donas la Esperanto-instruado eblojn, precipe ĉar la individuaj klasoj povas sin aligi al tiu sistemo de interŝanĝoj, kiuj kondiĉas egalan, samspecan instruon al infanoj je sama aĝo en diversaj landoj. La logika kaj regula strukturo de Esperanto donas al la lernantoj senperan komprenon pri gramatika konsisto de lingvoj ĝenerale, kaj tio donas bazon por, aŭ faciligon al ĉiu plua instruado en lingvoj, ne nur fremdaj sed eĉ ankaŭ rilate al la gepatra.

14. **Lokigo en la popollernejo** - Esperanto povas esti enskemigita duloke en la instruado: **A)** Tre frue, ekzemple en 3-a klaso ¹ dum almenaŭ 3 horoj dise laŭ semajno estante konvena enkonduko en la fremdlingva instruado kaj kiel apogo al la instruado en la gepatra lingvo. **B)** Kiel elektita fako en la superaj klasoj per sama horokvanto kiel sub A.

15. **Metodoj, enhavo kaj amplekso** - Por la Esperanto-instruado estas uzitaj la samaj metodoj kaj rimedoj kiel priskribite en la skizo: punktoj 4 kaj 5. Tamen emfazendas, ke unua fazo daŭras konsiderinde pli mallonge (Esperanto estas absolute fonetika, havas firman akcenton. Relative eta kvanto da vortelementoj ebligas, per derivado, grandan vortprovizon). Al unua fazo apartenas 600 vortelementoj. La fundamentajn regulojn akiris la lernantoj indukte per interparolo kaj legado. Dum la dua fazo la lernantoj akiras kroman vortprovizon je 800 plej ofte uzataj vortoj (laŭ tio la lernanto komprenas ĉirkaŭ 97 procente de ordinariaj tekstoj kaj interparolo).

Noto: 1) 3-a klaso = 9-10 jaruloj.

el finnujo

Raporto de la lerneja administracio de Finnlando al la landa eduka ministerio. Erhhi Aho, Hanna Jaakkola, 1974.07.17.a

Pro la propono ¹ de Esperanto - Ligo de Finnlandaj Instruistoj (ELFI), koncernanta la instruadon de Esperanto en la lernejoj de nia lando, la Lerneja Administracio estime deklaras jene:

Dum tiuj preskaŭ jardekoj, de kiam oni interesiĝas pri Esperanto, ĝi evoluis esprimkapabla kaj multflanka komunikilo. Kiel el la aldonoj de la propono de ELFI evidentiĝas, oni tradukis en ĉi tiun lingvon kaj ankaŭ originale verkis en ĝi kaj beletran kaj sciencajn literaturon. La esperantistoj de la tuta mondo havas multajn internaciajn kontaktojn inter si, kaj la lingvo funkcias bone kaj en la ĉiutaga vivo kaj sur la tereno de la oficiala lingvouzo.

En la geknaba lernejo de Somero en la jaroj 1958-1963 efektivigita eksperimento montris, ke oni povas instrui Esperanton pli rapide ol t.n. naciajn lingvojn, kaj ke la lernado de Esperanto do estas pli facila ol tiu de la aliaj lingvoj. La rezultoj de la eksperimento de Somero aludas ankaŭ al tio, ke la lernado de Esperanto eble helpas la lernanton pli facile proprigi al si aliajn lingvojn. Tamen oni ne akceptis Esperanton kiel oficialan lingvon de la Unuiĝintaj Nacioj kaj de la aliaj grandaj internaciaj organizaĵoj. Ĝi ankaŭ kredeble apartenas al la oficiala lerneja lingvoprogramo de neniu ŝtato.

Laŭ la esploro de la Komisiono por la plivastigo de la lingvoscio² oni instruas Esperanton en Finnlando en la universitato de Helsinko ³ kaj ĉe la libera popolklerigado. La nombro de la studentoj estis en la lernejo 1970 - 1971 ĉirkaŭ 900 personoj. En la lernejoj oni nuntempe ne instruas Esperanton. Ĉe la supera grado de la baza lernejo en Kuhmo komenciĝos la lernado kiel speciala kurso en la lernejo 1974 - 1975 ⁴.

Por ke Esperanto helpu la lernadon de la aliaj lingvoj, ĝi devus havi la pozicion de la unua fremda lingvo, t.n. bufrolingvo. En Somero oni instruis Esperanton ĉe la klasoj I - III de la duagrada lernejo ⁵ kaj krome en lingvokluboj. Jam ĉe la dua klaso oni komencis flanke de Esperanto la lernadon de alia fremda lingvo, kiu havis normalan nombron da studhoroj. La bezonatajn ekstrapajn studhorojn oni prenis de la gepatra lingvo. Ĉe la supera grado de la baza lernejo simila aranĝado ne eblas, ĉar la nombro de la studhoroj en la semajno estas konsiderinde pli malgranda ol en la duagrada lernejo dum la eksperimento de Somero (ĉe la 3-a kaj 4-a klasoj de la baza lernejo en 5 tagoj po 2 studhoroj, ĉe la I - III klasoj de la duagrada lernejo en la jaro 1963 en 6 tagoj po 5 studhoroj). Se la instruado en la lingvokluboj ne estos aranĝebla, la lingvoscio de Esperanto rustiĝos pro la manko de uzo. Aliflanke Esperanto apenaŭ trovos lokon en la lernejoj planoj de la komunumoj, se ĝi estus, same kiel la franca, la germana kaj la rusa lingvoj, elektebla kiel la unua fremda lingvo, anstataŭ la angla aŭ la dua hejmlanda lingvo ⁶.

Se Esperanto havus la pozicion de la unua fremda lingvo, la kvalifikado de la instruistoj de Esperanto devus okazi en la universitatoj same kiel tiu de la aliaj

Someraj Universitataj Kursoj

lingvoj. Tio kondiĉus la enkondukon de Esperanto ankaŭ kiel ekzamenan studfakon de la universitatoj.

Plej bone Esperanto konvenas al la lingvoprogramo de la baza lernejo kiel unu alternativo por la pozicio de la tria elektebla lingvo. Kiam oni jam iomete scipovas aliajn lingvojn, oni lernas Esperanton ankoraŭ pli facile. La enkonduko de Esperanto kiel trian elekteblan lingvon antaŭsupozas respektivan ŝanĝon de la dekreto pri la baza lernejo, koncerne la 2-an momenton de ĝia 20-a paragrafo. Daŭriga instruado en la liceo ne estas bezonata, dum Esperanto ne havas la oficialan mondlingvan pozicion. La raporto de la Komisiono por la plivastigo de la lingoscio esprimas la deziron, ke Esperanto estu instruata en la lingvokluboj de la liceoj.

Surbaze de la antaŭaj klarigoj la Lerneja Administracio prezentas kiel sian vidpunkton la jenon:

1. La eksperimenta instruado de Esperanto montris, ke oni povas instrui la lingvon al la finnaj gelernantoj kun bonaj rezultoj. Plia eksperimento ne plu estas bezonata.
2. Estas bone sekvi la rezultojn de la eksterlandaj eksperimentoj kaj precipe la reagojn de la Unuiĝintaj Nacioj al la pozicio de Esperanto.
3. Al la lingvoprogramo de la baza lernejo Esperanto konvenas en la pozicion de la tria elektebla fremda lingvo. Kaj en la baza lernejo kaj en la liceo, Esperanto devas havi la rajton esti instruata en specialaj kursoj kaj/aŭ en lingvokluboj.
4. La instruado de Esperanto kiel la unua fremda lingvo estos konsiderinda nur, se la Unuiĝintaj Nacioj kaj la aliaj tutmondaj organizaĵoj akceptos ĝin kiel sian oficialan lingvon.

Notoj (de la tradukinto).

- 1) 1974.01.23.a
2. En la jaro 1972.
- 3) Nuntempe oni ne instruas Esperanton en la universitato de Helsinko, sed en la universitato de Turku.
- 4) La instruado en Kuhmo komenciĝos en la lernejo 1975 - 1976.
- 5) En la 5-a, 6-a kaj 7-a lernejoj
- 6) La sveda lingvo

La celo de la Someraj Universitataj Kursoj (SUK) estas kontribui al aplikado de la Internacia Lingvo Esperanto en universitata instruado kaj al pliintensiĝo de la internaciaj sciencaj kaj universitataj rilatoj.

La du unuaj sesioj sukcese okazis dum someroj 1972-a kaj 1974-a en la Universitato de Liège (Belgio). Tiujn du sesiojn, kiuj enhavis la studdirektojn «lingvistiko» kaj «medicinaj sciencoj» por la unua, «biologio», «ĥemio» kaj «socilingvistiko» por la dua, entute partoprenis ĉirkaŭ centdek studentoj el 19 ŝtatoj. **Datoj:** 08 - 29 de aŭgusto 1976-a. La programo estas tiel aranĝita ke ĉiu kalendara semajno estas en si mem kompleta unuo tiel ke eblos profite partopreni kiu(j)ajn semajno(j)n. Oni tamen atentu ke povas ekzisti kurso(j) kiu(j) daŭros dum du semanoj (kp. la programon). Alveno kaj foriro okazos dimanĉe. **Loko:** Moderna kvartalo de la Universitata Institucio de Antwerpen (UIA) (Belgio), sufiĉe proksime de la urbocentro kaj de la haveno (estuaro de Skeldo).

ĝenerala programo

A. Biologio

D-ro C. Støp-Bowitz, profesoro pri zoologio, Universitato de Oslo, Norvegio:

elementa ekologio - zoogeografio

D-ro W.M.A. De Smet, esplorgvidanto en la Ŝtata Universitata Centro de Antwerpen kaj docento pri didaktiko de biologio en la Universitata Institucio de Antwerpen, Belgio: **nocioj pri ornitologio - studo pri speciala bestgrupo - la cetacoj**

D-ro B. Mészáros, docento pri zoologio, Universitato de Debrecen, Hungario: **enkonduko en la teorion biologion - la nuntempa ĉelkariologio kaj citotaksonomio**

B. Matematiko

D-ro W. F. Orr, asistanta profesoro pri matematiko, Hofstra Universitato, Hempstead, Usono: **multedroj kaj multoĉeloj - finiaj geometrioj kaj retoteorio** (en du partoj) **enkonduko al ne-eŭklidaj geometrioj**

D-ro O. Reiersøl, profesoro pri matematika statistiko, Universitato de Oslo, Norvegio: **probablokalkulo** (en du partoj)

C. Sociologio

D-ro P.G. Forster, lekciisto en fako de sociologio kaj socia antropologio, Universitato de Hull, Grandbritio: **sociologio - bazaj konceptoj kaj perspektivoj - la klasika tradicio en sociologia teorio - sociologio de la religio**

D-ro M. Dobrzyński, adiuncto en Ĉeflernejo de Planado kaj Statistiko kaj en Instituto de Organizado de Maŝinindustrio, Warszawa, Pollando: **enkonduko al socia teorio de organizaĵo - psikosociaj metodoj de organiza disvolvado**

Por kromaj informoj vin turnu al Someraj Universitataj Kursoj, B. P. 9, B-4000 Liège 3, Belgio.

Estraro de ILEI

- 1) Prezidanto: Rektoro Helmut Sonnabend, Im Eckerkampsfeld 11a, D-3161 Dollbergen (Fed. Resp. Germanujo)
- 2) Vicprezidanto: Direktoro Johano Ingusz, Liget út. 40, H-1102 Budapest X, (Hungarujo)
- 3) Sekretario: D-ro Mario Dazzini, C. P. 22, I-54100 Massa C., (Italujo)
- 4) Vicsekretario: S-ro Gaston Turin, 43 Rue Emile Magnin, F-25300 Pontarlier (Francujo)
- 5) Kasisto: S-ro Olle Olsson, Bantorget 3, S-222 29 Lund (Svedujo). p.ĝ.k. Stockholm 682 117-7.

Sekciestroj de la Ligo

- Aŭstralio: Ivan T.M. Maddern, Box 411, Morwell 3840, Victoria
Aŭstrujo: Margarethe Marischler, 1150 Johnstrasse 2, Vieno
Belgujo: G. Pirlot, Residentie «Vaughan», Kimmelbergstrasse 3-5/B-3 B-8400 Oostende
Brazilo: Elvira Fontes, Caixa Postal 5888, Sao Paulo
Britujo: Raif Markarian, 87 Sebastian Ave., Shenfield, Brentwood, Essex CM15 8PP.
Bulgarujo: Vasil Bozarov, ul. Ljubotran 98, blok 4, Vhod A, Sofia
Danlando: Lis Thune, Bremsbävänget 15, DK-2650 Hvidovre
Finnlando: Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
Francujo: F. Le Magadure, 23 Rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont
Germanujo: Hermann Behrmann, Bahnhofstr. 54, D-4972 Löhne 1
Grekujo: Sokrates Sakellaropoulos, Agias Paraskevis 30, Ateno
Hispanujo: Francisko Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante
Hungarujo: Marta Cser, Zelay út. 10-14, H-1368 Budapest V
Islando: Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, Reykjavík
Israelo: Ron Aser, Raanana, Aser 5
Italujo: Catina Giulia Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa C.
Japanujo: Gamon Higashi-cho 6-51, Koshigaya-shi 343
Jugoslavio: Miodgrad Stojanovič, Duruntorska ul. 2/IV-32, YU-11000 Beograd
Kanado: George Du Temple, 930 Ardmore Drive, R.R.2, Sydney, B. C.
Kolombio: Manuel Angel M. Apaetado Aéreo 50179, Medellin
Nederlando: O. Hoekstra, Frederikslaan 47, Schoorl-1719
Norvegujo: Elna Matland, Brekkeveien 50, N-4200 Sauda
Nov-Zelando: S-ino Gwenda Sutton, 1 Wood Steet, Upper Hut
Pollando: Teresa Nemere, str. J. Olbrachta 3/5 m 12, PL-87-100 Toruń
Rumanujo: Prof. D-ro Gabriel Tepelea, Calea Grivitei N-ro 222, Bloc 7, Scara B - Bucuresti 8
Sovet-Unio: Johannes Palu, Sõlme 21, SU-200016 Tallin, Eesti NSV
Nikolaj Starodubčev, poŝtrestante, SU-340047 Doneck
Suda Koreujo: Dae Young-Rhie, 240-19, Sang-do-2-dong, Yong-dung-po Ku, Seoul
Svedujo: Olle Olsson, Bantorget 3 - S-222-29 Lund
Svislando: Kurt Greutert, Via Monte Ceneri, CH-6512 Giubiasco
Usono: John L. Lewine, West Stockbridge, Mass. 01266

Kunlaborantaj organizoj aŭ izolitaj membroj

- Ĉeĥoslovakujo: Karel Kraft, poŝta 5, Zdaboř V-28, CS-261 05 Přebram
Germanujo DDR: Ludwig Schödl, Rosa Luxemburgstr. 37, DDR-195 Neuruppin
Kubo: Pedro Pablo Lamas Díaz, Apartado 283, Ciego de Avila
Zairo: Antome-Samuel Ngangu, B.P. 13, Lukala (Nkandu)